

*Aplaŭdo por la araba lingvo-politiko de Simo Milojeviĉ
en Esperanto de UEA, januaro 1974*
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 543, 1974.03.06 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La legantoj de la revuo *Esperanto* de UEA certe rimarkis en la numero de januaro 1974 la artikolon de sinjoro Simo Milojeviĉ pri la altiĝo de la araba lingvo al la rango de 6-a oficiala kaj labora lingvo de Unuiĝintaj Nacioj. Titolo de tiu dupaĝa kaj bone dokumentita artikolo : *Aplaŭdo por la araba lingvo-politiko*.

A.- En sia artikola konkludo sinjoro Simo Milojeviĉ skribas : « *Tia tempesta ascendo de la araba, en unu sola jaro aŭ en kelkaj ĝiaj monatoj nur, al plena rekono en Unuiĝintaj Nacioj, aldonas plian spicaĵon en la mondan lingvo-kaldronon, spicaĵon apenaŭ manĝeblan, sed ĝi tutcerte, per plia kaosigo de la lingva demando, decide kontribuas al la konsciiĝo de la homaro pri la graveco kaj aktualeco de komuna internacia komunikilo. [...] La araba lingvo-politiko estas afero, kiu plej rekte koncernas ankaŭ nin esperantistojn, kaj ĝi meritas nian senrezervan apogon kaj admiron. Ĝi estas akvo por nia muelilo.* »

Cl.- Laŭ la informoj, kiujn alportas sinjoro Simo Milojeviĉ en tiu artikolo, jen la ĉefaj eventoj, kiuj kondukis al la oficialigo de la uzo de la araba lingvo en Unuiĝintaj Nacioj :

A.- Unue, oni sciis, ke de kelkaj jaroj la araba jam estis oficiala kaj labora lingvo de pluraj specialigitaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj : Unesko, FAO, ILO kaj WHO, la organizaĵoj okupiĝantaj pri kulturo, agrikulturo, laboro kaj elmigrintoj. La araba ankaŭ estas oficiala kaj labora lingvo de Organizaĵo de Afrika Unueco.

Cl.- Tamen, la nuna rekono de la araba en la monda organizaĵo UN estis tiel subita, kompleta kaj senrezerva, ke oni ĝin nur helpe de gravaj penstordoj povus rigardi kiel rezulton de tiuj pli fruaj klopodoj. Kontraŭe, ĝi estis rezulto kaj parto de la ĝenerale lastatempa taktiko de la arabaj ŝtatoj, tiu sama, kiu tertreme skuis la ne-lingvajn mediojn kaj kriteriojn.

A.- La tuto eble komenciĝis per plurdeko da samstilaj kaj samenhavaj leteroj, kiujn fine de oktobro 1972 distribuis la libiaj ambasadoj tra la mondo. Kopio de unu el tiuj leteroj troviĝis ankaŭ en la redakcio de la revuo *Esperanto*. Ĝi kun sia tuta stila fajneco tekstis jene :

Cl.- « *La Ambasado de la Araba Respubliko Libio en Bruselo prezentas siajn komplimentojn al la Diplomataj Misioj akredititaj en Belgujo, kaj havas la honoron informi ilin, ke la Registaro de la Araba Respubliko Libio decidis estonte ne plu akcepti ajnan pasporton, se la araba ne estas unu el la lingvoj uzataj en ĝia redakto. Ĉi tiu decido estas valida ekde la 1-a de januaro 1973. La Ambasado de la Araba Respubliko Libio en Bruselo kaptas ĉi tiun okazon por renovigi la certigojn pri sia tre alta aprezo de la Diplomaciaj Misioj, akredititaj en Belgujo.* »

A.- Tiu ĉi letero, kaj plurdekoj da similaj, reeĥis preskaŭ bombe tra la mondo. Malfacile troveblas gazeto, kiu almenaŭ ŝerce (kaj tion oni ja plej ofte eĉ faris) ne raportis pri « *la nova kaprico* » de la ribelema libia junuleca prezidanto. Ankaŭ la revuo *Esperanto* notis la eventon per iom pli ol 6-linia novaĵo en decembro 1972.

Cl.- Je la difinita dato la libiaj doganoj komencis aplikadi la decidon, kio revenigis de la libiaj landlimoj centojn da diplomatoj, komercistoj kaj turistoj.

A.- Nova bombo : la 17-an de oktobro 1973, finiĝis en Kuvajto konferenco de la Organizaĵo de Arabaj Nafto-Produktantaj Ŝtatoj. Je la fino de la Konferenco oni laŭtleĝis komunikon pri la estonta nafto-produkta politiko, ne en la angla kiel volis la kutimo, sed en la araba lingvo. Kiam mondfama ĵurnalisto de eĉ pli fama ĵurnalo demandis, kie li ricevos la anglalingvan tekston de la komuniko, la araboj arogante atentigis lin, ke la anglalingva teksto de la komuniko eĉ ne ekzistas kaj, « *se li bezonas ĝin, li mem traduku.* » Similaj eventoj ripetigis kaj ripetigas ĉe ĉiu araba renkontiĝo aŭ konferenco.

Cl.- Lasta evento : Komence de decembro 1973, antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko troviĝis propono, ke la araba aldoniĝu kiel plia – sesa laŭvice – labora kaj oficiala lingvo de la monda organizaĵo. La 18-an de decembro 1973, strange, tute sen kontraŭstaroj, estis farita unuanima decido, ke la araba fariĝu unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo, ĝiaj komitatoj kaj sub-komitatoj. La 19 arabaj ŝtato-membroj de Unuiĝintaj Nacioj konsentis pagi la koncernajn kostojn por la unuaj tri jaroj, kiujn oni por 1974-1975 taksas je pli ol 4 milionoj da usonaj dolaroj.

A.- Pri tiuj du lastaj kaj decidigaj eventoj la gazetaro ne plu raportis ŝerce. En la franclingvaj landoj ĝi eĉ silentis pri tiuj okazaĵoj, kiuj tutcerte estas minaco al la statuso de la franca lingvo ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!